

kiu emfazus pasivecon de subjekto ĝis tia grado.

Konsideroj pri la supereco de la Aliulo estas profundigataj laŭ vidpunkto de la respondeco. Lévinas diras, ke la subjekto estas metita en situacion, en kiu ĝi devas preni sur sin la respondecon por la Aliulo sen scii pri la origino kaj kialo de tio. Ĉe "respondeco" temas pri tio: ekzisti kontraŭ la Aliulo por respondi. Do la rilato mem al la Aliulo estas respondeco, kaj tial subjekteco estas identa kun respondeco. Kvazaŭ la mio estus kaptita de la Aliulo. En tiu senco Lévinas diras, ke la subjekto estas "ostaĝo". La vorto ostaĝo, kvankam stranga, esprimas lerte la aferon. Plue antaŭenirante, Lévinas starigas jenajn demandojn, la plej seriozajn: "Ĉu mi havas rajton esti?", "Ĉu mi, estante en la mondo, ne prenas la lokon de iu?", "Ĉu mi, estante, ne mortigas?" Germana filozofo Martin Heidegger, pri kies filozofio Lévinas ĉiam konscias intencante ĝin transiri, starigis, kiel baza demando de la metafiziko, jenan demandon: "Kial ĝenerale estas estaĵoj prefere al neio?" Tiu ĉi estas ontologia demando, kiu demandas pri kialo de esto de la mondo. Kontraŭe al tiu ĉi ontologia demando Lévinas starigas bazan demandon el etika starpunkto. Ankaŭ ĉi tie prezentigas lia sinteno vidi la unuan filozofion ne en la ontologio, sed en la etiko.

Nun la argumento pri la vizaĝo ĉe Lévinas ne limiĝas je malvasta duo-rilato. Lia pensado, surbaze de la vizaĝo, tra konsideroj pri amo, patro-filo-rilato, frateco, ktp., elvolviĝas ĝis la problemo de societo kaj justeco. La societo ne konsistas en nura interrilato inter multaj homoj. Tiel longe, kiel la societo estas personeca rilato, ankaŭ pasejo al ĝi kuŝas en la vizaĝo. Lévinas diras: "La tria persono rigardas min el la okuloj de la Aliulo". "La tria persono" indikas, post ĉio, ĉiujn homojn krom "mi" kaj "vi". Tial Lévinas diras ankaŭ, ke aperado de vizaĝo apertas la homaron. Malantaŭ la Aliulo, kiun, kiel vin, mi rilatas, estas multaj Aliuloj kiel triaj personoj, kaj ilia ekzisto jam estas apertita en la vizaĝo de la Aliulo kiel "vi". Per tio, aŭ surbaze de tio, la mio povas konkrete rilati al multaj Aliuloj. En la situacio de la rilato kun multaj Aliuloj ŝoviĝas antaŭen la problemo de justeco. Sed nun mi ne povas eniri en tiun ĉi problemon. Ĉiuokaze Lévinas antaŭenpuŝas sian etikan meditadon en rilato kun la vizaĝo ĝis la fino.

La pensado de Lévinas, pri kiu mi supre maldetale parolis, eble ŝajnas al vi tre abstrakta kaj stranga. Tio estas kaŭzita de la neebleco reprezenti ĉi tie liajn detalajn fenomenologiajn analizojn. Mi esperis, ke vin interesos lia aliulo-centrismo, kiu, certe iom ekstrema, igas tamen nin pripensi multe. Ĉu ni vere aprobas la aliecon de aliaj homoj kaj de aliaj estaĵoj? Aŭ ĉu ni vere ne estas enfalitaĵ en egoismon, ne nur sur individua nivelo, sed ankaŭ sur grupa, nacia, ŝtata niveloj? Rigardi la Aliulon kiel Aliulon, rekoni la dignecon kaj sendependecon de aliaj homoj, tio estas ja tre simpla, sed samtempe tre malfacila kaj grava.

Pri amo si kantis en tempo malamoza

Edmund Rosner

(La du versaĵojn kaj la roman-fragmenton de A.J.Koenig tradukis Kazimierz Szczurek)

Esperanto kiel ideologio ĉiam havis karakteron humanisman, tial ĝi ĉiam solidaris kun manifestaĵoj de la humanismo. Ĉi tiu konstato klarigas, kial ni direktas la atenton al verkistino ĝis nun ne konata en la esperanta literaturo, sed meritanta tiun literaturon eniri. Ŝi eniru do tra la centenario de sia naskiĝo (vidu rimarko ĉe la fino de la teksto).

Alma Johanna Koenig (18/07/1887 – 1942), austra poetino kaj prozistino, apartenis al la intermilita viena literaturo. Ŝian nomon oni citis apud la plej elstaraj tieaj verkistoj kiel Felix Braun, Alfred Grünwald, Emil Lucka, kaj komparis al la plej eminentaj reprezentantinoj de la virina literaturo – Anette von Droste-Hülshof, Elizabeth Harriet-Browning, Marianne Alcoforado kaj Lou Andrea-Salome. Ŝia famo apogeis en la dua kaj tria jardeko de nia jarcento, kiam ŝiaj verkoj aperadis originale en Aŭstrio kaj Germanio kaj tradukite en Svedio, Britio, Pollando, Kroatio, Hungario. Tiu famo ne forvelkis ĝis nun, la verkistino oni omaĝas en Eŭropo kaj Ameriko, precipe kiel bardinon de multnuaanca amo.

A. J. Koenig naskiĝis en Prago, kvankam ŝiaj gepatroj devenis el Galicio. En la jaro 1888 ili venis al Vieno, restis pordauere, kaj kun tiu urbo ligiĝis la vivo de la verkistino. Tie ŝi kreskis en burĝa hejmo de reĝa imperiestra oficiro, sorbis etoson de la krepuskanta habsburga monarkio, tie ekkonis literaturan rondon de Felix Braun, debutis en la revuo "Zeit", publikigis siajn ĉefajn verkojn, establis propran hejmon kun barono Bernhard Ehrenfels, travivis kolapson de la edzineco, travivis la mornajn jarojn de la nazia regado, en kiu ununura ĝojiga radio estis la ligo kun Oskar Jan Tauschinski – el tie oni transportis ŝin al koncentrejo en Blankrusia Minsk, kie ŝi pereis. Do,

krom esceptaj kvin jaroj travivitaj en Alĝerio, ŝia sorto paralelis kvindek jarojn al la sorto de Austrio kaj precipe Vieno.

Sur paĝoj de ŝiaj verkoj (ekz. en la romano "Leidenschaft in Algier" – "Pasio en Alĝero") troveblas belaj pruvoj pri ligiteco kun la ĉedanuba urbo. Troveblas ankaŭ atestoj pri ideologiaj kaj artaj ligoj kun la intermilita austra literaturo. Malgrau tio, la autorinon de "Der jugendliche Gott" oni ne opiniu nure reprezentantino de regiona, loknuanca literaturo. Ekde la komencaj verkaĵoj ŝi iris propran vojon kaj spegulis – pere au senpere – propran regnon de travivaĵoj kaj spertoj. Tiel ŝi procedis same en la poezio kiel en la prozo, kaj ŝi kreskis je verkistino pene klasifikebla al la tiam distingitaj ideologioj au artaj fluoj, kvankam ŝi ne distanciĝis disde la spirito de sia epoko – male: ŝi spegulis ĝin per prismo de sia riĉa kaj komplika personeco.

Alma Johanna Koenig debutis per la volumeto "Die Windsbraut" (*Uragano*), kaj ĝis la lastaj momentoj de la vivo ŝi verkadis lirikaĵojn, poste kolektitaj en la volumo "Lieder der Fausta" (*Kantoj de Fausta*), "Liebesgedichte" (*Ampoemoj*), "Sonette für Jan" (*Sonetoj por Jan*). Ekstreme sincere ŝi dokumentis en ili etapojn de sia vivo, la vojon tra amekstazoj kaj suferoj, gvidantan de erosó ĝis karito. La versaĵoj tamen ne estas nure lirika memorlibro, ili estas erotikaĵoj havantaj – krom elementoj de propra travivado – dimension ĝeneralan, universalan, ili ekzempligas diversajn nuancojn de la amo. Jeni koncernas proksimume la versaĵojn el la tarda tempo, en kiu al la erotika fadeno fonas "epoko sen lumo kaj koloro".

En la intermilita austra liriko A.J. Koenig okupas fiksan lokon, atestas pri tio represado de ŝiaj versaĵoj en postmilitaj antologioj. Poemoj kiel "Algier", "Credo", "Mein Herz ist betrübt" (*Tristas mia koro*), "Herz ohne Heimat" (*Kor' sen patrio*), apartenas al pintaj poeziaj atingoj daŭre memorigataj kaj trovantaj fidelajn legantojn.

Vivas ankaŭ la prozo de la verkistino. La novelon "Schibes", ofte komparatan al "Krambambuli" de Ebner–Eschenbach, Franz Theodor Csokor lokigis en la libron "Die schönsten Erzählungen aus Oesterreich" (*La plej belaj rakontoj el Austrio*). La rerakontita sagao "Gudrun" apartenas al klasikaĵoj de la porinfana literaturo, originalan vizion de Bizanco en la tempo de

Justiniano prezentas "Der heilige Palast" (*La sankta palaco*), kaj tiun de Islando eksetlata far norvegoj: "Die Geschichte von Half dem Weibe" (*La historio pri Half dem Weibe*), tamen, oni opinias la plej valora verko la daŭre reeldonatan libron pri la adoleskanta Nerono, "Der jugendliche Gott" (*La juneca dio*).

Tiun romanon Koenig verkadis ĝis la lastaj tagoj antaŭ la transporto en koncentrejon. Jam antaŭ la anekso de Austrio ŝi troviĝis en komplika financa situacio, kaj post kiam germanaj taĉmentoj ekokupis Vienon, ŝi ekapartenis al la persekutatoj. En etoso de senĉesa minaco, suferante mizeron kaj malsaton, ŝi verkadis sian ĉefan romanon, en kiu ŝi serĉis respondon je principa demando: kio kauzis, ke la promesplena Klaudio evoluis je sangavida, kruela Nerono.

Por konstrui historion de la juna romia imperiestro, Koenig studis fontverkojn, kiujn ŝi kolektadis ekde sia junaĝo (kvankam dum la verkado ŝi mem ne disponis pri ili) kaj profitis ankaŭ sian psikologian scion, kontrolitan per propraj spertoj. Ŝi ne evitadis aludojn, tamen ne kreis paralelojn inter Nerono kaj Hitler.

"Der jugendliche Gott" estas romano biografia riĉa je historiaj faktoj, saturanta en la leganto la soifon pri autenteco; sed la autorino ne rezignis pri sia rajto pentri propran vizion de la priskribata tempo kaj interpreti la heroojn, precipe Neronon mem. Ŝi kreis verkon naturan, brilanta per multaj valoroj de la rakonta arto.

La daŭre reeldonataj verkoj de Alma Johanna Koenig apartenas al la humanisma tradicio de la eŭropa kulturo. Kvankam ili ne troviĝas en la fluo, kiu alportis la verkojn de Hermann Broch, Robert Musil, Albert Gütersloh kaj aliaj, ili riĉigas la modernan leganton per sia enhavo spegulanta la forpasantan tempon de la dua kaj tria jardekoj de la XX-a jarcento observata tra prismo de propraj spertoj de la verkistino kaj propra provo legi la paseon. La ĉefa motivo de ŝiaj verkoj estas la amo, komprenata tre multflanke, ankaŭ kiel servo por proksimumo, kiel ofero el sia egoismo por feliĉo de la kunhomoj.

En la verkaro de Koenig – tion akcentas preskaŭ ĉiuj kritikistoj – sentebblas escepte forta harmonio inter ŝia verkistina misio, kiel ŝi ĝin

komprenis, kaj ŝia propra persona vivo. Por multaj ŝi estis modelo. Herbert Burgmüller skribis al ŝi en 1941: "Mi ofte pensas pri vi kaj pri via grandioza homeco. Ĝi influis min enorme kaj helpis min penetri pli profunden en mian memon."

Dum la unuaj kvin tagoj de la restado en tielnomita Sammellager, antaŭ la transporto en koncentrejon, ŝi skribis al Oskar Jan Tauschinski: " Mi volas provi iri kun levita kapo en mian estontecon. Ĝi estas nigra kiel pordego kiun eniras funebraj figuroj sur la monumento de kristaninoj en la preĝejo de augustenanoj. Mi feliĉas ke Dio permesas al mi trasuferi mian Golgoton sola. Pensu pri mi ne aliel ol kiel pri soldato iranta al fronto. Mi sentas la dian volon kaj mi obeas ĝin ĝoje. Salutojn al ĉiuj, kiuj pensas pri mi. Mi amas vin kaj dankas pro ĉio. Mi fidus Dion firmigantan min mirakle."

Inter multaj dokumentoj pri vera humanismo en la lastaj jardekoj la supra ŝajnas aparte memorinda.

Alĝerio

Altege bluo serafa de l' ĉiel'
sin super palmoj etendas.
Pli bluas mar', egalas ĝi per hel'
al rob' kiu sur Jungfrau pendas.

Blankaj siluetoj de moskeoj
akras ĉe horizontflank'
kaj palacoj en denso de bugenvileoj
dronas en blindiga blank'.

Meditas mi: malvarmas ĉe vi nun,
en forn' vi gratas por stimul',
vesperojn frue vokas la autun',
pinaroj dronas en nebul'.

Vi lignon staplas ĉe alsuda mur'
kaj zorgas pri surputa bud'...
Mi hejme al vintro sopiras nur,
kiel vi al palmoj de sud'!

Soneto sepa el la *Sonetoj por Jan*

Tra mondo sen koloro kaj sen lumo
mi iras, kvazau drone en sufer'.
Ĝi min vadigas, surverŝas kun sever' –
vivas nur ci, multaj fariĝis humo.

Malsata, nun mi scias pri mizer'.
Tutsola, mi sopiras pri brakumo.
Nutras min ne rikolto, sed spikumo –
vivas nur ci, benitu Di–mister'!

Kompatu, abomen', kolero, timo –
jen tag', kaj nokto – preĝo, dub', sopir'.
Ci vivas, do revas mia animo.

Mi ploras, stumblas ankau via ir'!
Sopiras mi vin vidi el proksimo
kaj beni ke vivantas via spir'!

Fragmento el la romano *La juneca dio*

... Ĉu Via Majesto audis – rakontis Piso la plej freŝajn sciaĵojn el Romo al Agripina restanta en Tusculum – kiel entuziasmiĝis la servila kaj flatema senato, kiam alvenis sensaciaj sciigoj pri venko de Korbulono? ... Lau decido de la senato kaj je ties kostoj la armeo salutu Neronon kiel imperiestron, kaj je lia omaĝo okazu dankaj solenaĵoj! Tiam ekstaris unu el la senatanoj kaj postulis starigon de monumento. Alia eksaltis kaj postulis, ke oni atribuu al Nerono la senatoran oficon por multaj jaroj kaj ankau, ke la tagon de la venko, tiun en kiu oni anoncis la venkon kaj tiun, en kiu oni sciigis pri ĝi la senaton oni deklaru festotagojn. – Kaj nun, kiam mi rakontas tion, vi pensas, Via Majesto, ĉu iu ekstaris por savi la honoron de Romo, vi pensas, ĉu tiu homo eble estas mi mem? Bedaurinde, Imperiestrino, vi eraras!

Glosaro

bugenvileoj	rampa planto, kies nomo devenas de la propra nomo de Louis Antoine de Bougainville; li alportis ĝin al Europo
Galicio	la suda parto de Pollando aneksiita en la XVIII-a jarcento far Austrio
Jungfrau	monto en la Svisaj Alpoj kun eterna neĝo ĉepinte, fama pro sia belo
monumento de kristaninoj	tiu monumento troviĝas en la preĝejo de la augustenanoj en Vieno
Sammellager	etapa koncentrejo el kiu la kaptitoj estis dissendataj al diversaj ordinaraj koncentrejoj
spikumo	kolekti spikojn post rikolto, vivi tre mizere
stumblas ankau via ir ¹	ankau la vivo de O. J. Tauschinski estis tiam tre malfacila.

(Pro perdiĝo de la unua sendita manuskripto la aperado prokrastiĝis; nun ni ricevis duan manuskripton rekte flanke de la aŭtoro – rh).

Specio kaj genro en la biologio*

W.M.A. De Smet[†]

1 Enkonduko

En scienco kiel la biologio forte sentigas la neceso klare povi difini la unuojn, en kiuj grupiĝas la individuoj laŭ ilia plia aŭ malplia simileco. Tuj montriĝas ke la terminoj de la ĉiutaga vivo, kiel "speco", "genro", "grupo"... ne konvenas kaj ke ili estas anstataŭindaj per pli klaraj terminoj, kiuj celas pli difinitajn nociojn.

En pluraj lingvoj tiuj bezonataj terminoj ekzistas efektive por respondi al tiaj bezonoj. Ankaŭ en Esperanto, jam antaŭ jardekoj aperis la termino "specio" por pli klare difini iun specifan biologian nocion ol tion faras la ĝenerala termino "speco". Simile la vorto "genro" jam delonge ekzistas, havante pli specifan signifon ol la vorto "genro".

Sed la ekzisto de tiuj specifaj terminoj neniel signifas ke la nocioj pri specio kaj genro estas klaraj. Fakte, se oni povas unufanke diri ke ekzistas kelkaj bonaj difinoj pri la nocio "specio", tio aliflanke neniel valoras pri la nocio "genro". Estas aparte interese iom analizi tiun situacion, tiom pli, ĉar la nocio "specio" havas specialan rolon pri la sciencaj nomoj de la organismoj kaj tio do ankaŭ havas kelkfoje sian influon en la vortfarado en la diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Plie, la fakto ke Nova Biologia Nomenklaturato, speciala sistemo, kiu uzas Esperanton por fari tute novajn sciencajn nomojn, komplete preteriras la genran rolon en la nomfarado, jam elvokis kelkajn reagojn, kaj tio klare montras ke kelkaj biologoj en siaj konceptoj pri taksonomio tre forte alkitimiĝis al la nocio "genro", — ĝis tiu grado ke ili ne konscias ke ĝuste la genro estas unu el la plej pridiskuteblaj nocioj el la sciencoj. Analizo de la koncepto pri specio kaj genro kondukas al kelkaj interesaj konkludoj, kiuj povas servi kiel tezoj.

*Teksto submetita al la ĵugantaro de la sekcio "Morfosciencoj", Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino, 1987

[†]Dr Sc. (Leuven), Dr sc. nat. (AIS); esplorgvidanto en la Ŝtata Universitata Centro de Antverpeno (RUCA); iama profesoro de zoologio en la Nacia Universitato de Ruando; asocia profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj; adreso: Hertendreef 12, B-2920 Kalmthout